Krist' Jesuo, bona pastro

JESU KRISTE, ŠTĚDRÝ KNĚŽE



2. Vi al ni en mondon venis.
Via korp' de vundoj plenis,
ĉar kristanoj ni pekemis,
graca Kristo.

3. Ho, el Via digna trono
fontas al ni ĉia bono,
venas al ni riĉa dono,
graca Kristo.

La strofoj 4 ĝis 26 ne estas transprenitaj.

27. Vi al ni la sangon donis,
al ni trinki ĝin ordonis,
al ni por util' proponis,
graca Kristo.

28. Daŭre Vi al ni doniĝas,
graco Via al ni riĉas.
Ni Vin danki ne sufiĉas,
graca Kristo.

29. Pretis Vi nin anstataŭi,
por ni vivon eĉ malhavi,
nian kulpon mem forlavi,
graca Kristo.

30. Kare Vi nin elaĉetis,
por nin servi Vin elmetis
al sufer' kaj morto pretis,
graca Kristo.

31. Via grac' mister-silentas,
ve, se ni ĝin malatentas,
sen konsol' ni tarde pentas,
graca Kristo.

32. Ne herezu do, kristano,
prenu bonon el la mano
de Di-fila korp' en pano,
graca Kristo.

33. Kristo, por ni torturita,
mort-palega, sango-ŝvita,
restu karo voj-invita,
graca Kristo.

34. Laŭdu ni Jesuon karan,
por ni al ofendoj staran,
per eterna viv' regalan,
gracan Kriston.

35. Per Li de malbon' seniĝu
ni, en ĉiuj vortoj riĉu,
en eterna viv' feliĉu,
graca Kristo.

36. Estu laŭd' al Patro Dia,
al sampova Filo Lia,
al Spirit' inspiro nia,
graca Dio.

37. Tiu laŭd' ne ĉesu soni,
por eterna ĝojon doni,
nin ne lasu triston koni,
graca Kristo.

JESU KRISTE, ŠTĚDRÝ KNĚŽE • kp. Kancionál 706 • M: himnaro de Jistebnice 1420 • ĉeĥa T: Jan Hus (ĉ. 1370-1415) • E: Jiří Kořínek (1906-1988)